



ENHAVO

Kalendaro.....	1
Okazis.....	3
Les besoins d'EKC : Un jeune volontaire européen, et un nouveau secrétaire.....	3
Piedmigrado en Arrout*.....	3
Kongreso de UFE.....	5
La raporto de la kluboj.....	6
Bela etoso dum Kataluna Printempa Renkontiĝo.....	8
Vidpunkto.....	9
La biblioteko de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo.....	9

Kalendaro

De la 16a ĝis la 22a de julio: SPR! Senprograma Renkontiĝo.

Internacia tendumado en Callosa de'n Sarrià,
proksime de Alakanto (Hispanio).
Okazigota de Kataluna Esperanto-Junularo kaj
Valencia Esperanto-Junularo kune kun Varsovia
Vento.

<http://www.esperanto.cat/spr>

De la 19a ĝis la 25a de julio: 20a Internacia Junulara Semajno, Tab, Hungario.

Temo: "Felican naskiĝtagon, IJS!"

<http://www.ijs.hu>

De la 21a ĝis la 27a de julio: Somera lernejo de Esperanto – „Slava Esperanta Studado“ (SES)

Instruado de Esperanto en belnatura loko kaj
pli profunda **konatiĝo kun slavaj kulturoj** –
ĉiujare en alia slava ŝtato. Ĉijare en Slovakio!

<http://ses.esperanto.sk/>

De la 21a ĝis la 29a de julio: Inter-Regiona Internacia Samajno (IRIS) en Zalaegerszeg, Hungario.

Poŝte: Hungaria Esperanto-Asocio,
HU-1081 Budapest, VIII, Kenyérmező u. 2.,
Humana Eŭropo-Asocio, HU-8900
Zalaegerszeg, Iskola köz 3,
Rete: esperanto@heszperanto.hu, sojtor@t-online.hu

De la 20a ĝis la 27a de aŭgusto: FESTO – Muzika Festivalo

La plej bonaj esperantaj muzikbandoj koncertos
en Montoire-sur-Loire, Francio.

Okazigas: JEFO Espéranto Jeunes
<http://esperanto-jeunes.org/festo2007/>

Du 3 au 7 Septembre: Stage Linguistique d'Espéranto à Toulouse.

TEF (Tuluzaj Esperantistaj Fervojistoj),
TEF-44 Rue de Marseillan 31240 l'Union,
<http://perso.orange.fr/TEF-ESPERANTO/>

Esperanto-Kultur-Centro

1 place des Avions, 31400 Toulouse

tel/fax 05 61 25 55 77

esperanto.toulouse@free.fr <http://esperanto.toulouse.free.fr/>

Okazis

Les besoins d'EKC : Un jeune volontaire européen, et un nouveau secrétaire

Le conseil d'administration d'EKC a tenu sa dernière réunion à Belcastel le 29 juin.

Après avoir fait le bilan de l'année, plutôt positif, on a surtout parlé des projets pour l'année à venir, parmi lesquels se distingue la venue d'un jeune Volontaire Européen, envoyé dans le cadre du programme SERVICE VOLONTAIRE EUROPEEN (SVE) pour notre projet intitulé « Connaître l'espéranto à l'Ecole ». Son travail sera de seconder Samia - dont le contrat de travail (CAE) va être reconduit pour un an - dans toutes ses tâches, afin de mieux faire connaître l'espéranto dans les écoles et universités. Début septembre, nous devrions donc accueillir le jeune Przemek Wierzbowski, étudiant en droit de 21 ans, originaire de Bialystok, secrétaire de l'association des Jeunes Polonais Espérantistes (PEJ), pour une année scolaire.

Outre des cours à mettre en place, on a parlé longuement du projet de Fête régionale le 15 décembre à l'occasion de l'anniversaire de Zamenhof.

On a malheureusement dû constater la **vacance persistante du poste de Secrétaire**. Une personne en charge de la correspondance générale de l'association est vraiment nécessaire, et nous espérons trouver des candidats dès la rentrée.

Nous vous disons à tous : **à la rentrée du mois de Septembre**, où nous nous réunirons pour accueillir Przemek.

Jeannette Cash

(Responsable des cours et du projet "l'espéranto à l'école")

P.S. Dum mi skribis tiun artikolon, mi ricevis perskajpan alvokon de Przemek, kiu anoncas, ke la definitiva decido pri lia subvenciado okazos ĉe la mezo de julio. Kaj la ŝancoj por pozitiva respondo estas grandaj.

Piedmigrado en Arrout*

Aŭ kiel ellerni esperanton



Ni estas en 2007 post JK, tuta Francujo estas okupata de la kapitalisma imperio. Tuta? Ne. Vilaĝeto loĝata de nesubmeteblaj esperantistoj ankoraŭ kaj ĉiam rezistas al la invado, vilaĝeto kies nomo estas Arrout.



Interalie, la loĝantoj konas la sekreton de bona ellerno de Esperanto, la internacia lingvo estas konsiderata kiel timinda armilo kontraŭ la nuntempa rezigno.

Iun semajnfino de junio, kuniĝis en Arrout grupeto de malnovaj, pli novaj, eĉ estontaj esperantistoj, malpaciencaj malkovri la sekreton de ellerno: magia pocio kiun konis nur la vilaĝanoj de Arrout.

Sed tia magia pocio bezonis kelkajn formularojn, iuj facile kolekteblaj, aliaj pli malfacile...bona okazo por samtempe malkovri la ĉirkaŭon de la vilaĝeto.



La grupeto, gvidata de du vilaĝanoj, frue ekmigris al magia arbaro, unua etapo por kolekti la unuan formularon: la faman kaj tre raran flavan papavon, kreskantan nur en du ejoj de la mondo, en Himalajo kaj Pirineoj.

Antaŭ ol eniri la arbaron, ilia gvidanto Jopo atentigis la grupon: la magia arbaro, sub kies ŝtonoj vivas koboldoj, estuletoj kiuj havas egajn potencojn, estas tre danĝera ejo. Necesas esti tre atentaj por vidi ilin, sed evitu moki ilin, ĉar ili povas transformi vin en bufon.

Kaj finfine, jen ĝi...
La flava papavo!



La vojo transiris de la dekstra al la maldekstra bordo de la torento. Tute koncentritaj sur la vojo neniu vidis koboldon kaj ĉiuj atingis sanaj kaj senvundaj la randon de la arbaro.



Post tia malfacila elprovo, bonvene estas manĝi kaj ripozi sur la herbejo.



La bone ripozita grupo poste aliris la amikan vilaĝeton Balagué, kie devus ĉeesti la dua ero de la pocio: la mistera dukorna umo.



Bonŝance, la domo de profesoro Daniel estis malfermita, kaj ilin gastigis la granda kolektemulo de kamparaj tradiciaĵoj. Sed, kie trovi tiun misteran umon? En la kuirejo? En la banejo? En la dormejo?



Kaj finfine ili trovis ĝin! La dukorna umo!

Nun, ek al la kaverno por serĉi la lastan eron: strangan mallumeman besteton, kiun ŝategas la sorĉistinoj. Survoje al la kaverno, ili trapasis la ruinojn de antikva kastelo. Iom poste, ili trovis la enirejon de la kaverno. Ĉiuj malsupreniris kaj esploris ene...

Kaj subite, krio eĥis tra la kaverno!
Iu ĝin vidis:
la salamandron!

Kaj rigardu apude: bufo, eble malfeliĉulo kiu mokis koboldon...

Nun la lasta etapo, ek al la ŝtonĝardeno, kie atendas ilin la druido. La tri kolektitaj eroj nun devas esti metitaj antaŭ la piedon de la druido. Li eldiris ian magian formulon kaj sciigis ke ili devas atendi la vespermanĝon por eksenti la efikon de la pocio.

Malpaciencaj, ili revenis al vilaĝeto kaj survoje haltis ĉe la bazaro de Engomer, alia amika vilaĝeto, por aĉeti manĝaĵojn: aprojn, konfitaĵojn kaj kaprinan fromaĝon.

Vespere, la lacaj sed kontentaj esperantistoj bankedis ĉirkaŭ la tablo. Neniu certe sentis la efikon de la pocio sed la plezuron kaj la ĝojon kunsidi kaj kunfesti. Tio estis finfine la vera celo de la aventuro!

Christophe kaj Marion

Kongreso de UFE



Saluton al ĉiuj!

Mi promesis en la lasta *Krokodilo* ke mi rakontos al vi mian kongreson en Bourg-en-Bresse.

Okazis en la fino de majo dum la lingva forumo en Tuluzo .

Malgraŭ la pluvo, esperantistoj ĝojis ĉeesti ĉar la etoso estis laborema kaj festema.

En la urbofestejo, oni povis trinki ĉion kaj la libroservo estis tre riĉa.

Mi alvenis vendredon vespere kaj la sabaton mi tuj havis la komitatkunvenon de Esperanto-France (UFE). Temis pri la agadoj de la

federacioj en ĉiuj regionoj. Okazis ankaŭ ĝeneralaj asembleoj de UFE kaj GEE (Groupe d'Enseignants Espérantistes). La plej interesa por mi estis aŭdi diversajn agadojn en Francio; por plibonigi niajn reklamojn pri esperanto oni nepre devas komuniki kun aliaj aktivuloj.

Poste ni elektis novajn respondeculojn por UFE: novan sekretario, novan kasiston kaj novan eksterrilatulon.

Por distri nin, estis la koncerto de Kaj Tiel Plu (tradiciaj kantoj kaj dancoj), kiuj venis rekte de Katalunio, kaj Martin Wiese (Svedo) kiu kantis akustikan rokon.

Dimanĉon kongresantoj partoprenis la ceremonion pri 'arbo de paco' kun diversaj asocioj (Artisans du monde, France Palestine solidarité...). Oni plantis arbon kun la vorto *PACO* en diversaj lingvoj. Okazis paroladoj, kantoj... pri la paco. Kvankam pluvis, ni piknikis!(interne).

Sed ekzistis alia programo por homoj kiuj ne volas labori, ekzemple: vizito en la malnova urbo Brou, piedira radio, aŭkciado, aŭ prelegoj.

Venontan jaron estos esperantaj renkontiĝoj en Martigues (proksime de Marseille) ĉar en Bulonjo ĉe Maro (2005) oni decidis ke ĉiutrigare la esperantaj asocioj organizu komunan kongreson en kiuj partoprenos inter aliaj asocioj: Esperanto-France, SAT-Amikaro, FKEA,GEE...

Do ni rendevuu la venontan jaron, ĉu?

Samia Harir

Foto: Espéranto France

La raporto de la kluboj

Ĉijare, dank' al la laboro de la EKC-a dungito, Samia, esperanto eniris kelkajn mezlernejojn. La lernantoj rakontas al ni siajn spertojn:

En la mezlernejo Jacques Prévert de St-Orens :

Saluton, ni prezentas nin :

Ni estas la lernantoj de Samia en St-Orens. Ni lernis esperanton ekde septembro kaj ni ŝatus rakonti al vi la etoson de la klubo. Ni ne nur lernis gramatikaĵojn sed ankaŭ dialogojn kaj teatraĵojn. Per *Gerda*, ni amuziĝis, teatrumis kaj vidis la filmon: kompatinda Gerda!

Bedaŭrinde, ni ne vojaĝis ĉijare, sed kun Edukado.Net ni amikiĝis kun multaj geknaboj tra la mondo. Eble venontan jaron ni renkontos ilin ! Nun ni pretigas la feston de nia lernejo kaj ni volas prezenti esperanton en tiu tago al ĉiuj gelemantoj, gepatroj kaj instruistoj.

La mezlernejo de Marengo skribas :



Saluton al ĉiuj !!

Ni estas la lernantinoj en la klubo de Marengo.

Por ni la lingvo permesas komuniki en la tuta mondo, tial ni havas korespondantojn en

Argentino, Japanio kaj Rumanio. Ni ĝojis interŝanĝi kun ili kaj ni multe lernis pri iliaj landoj. Post kelkaj monatoj, ni volis krei nian blogon sur la reto por paroli al niaj korespondantoj pri niaj spertoj kaj vidmanieroj. Vidu "La langue de ouf". Eĉ se ni ne estas spertulinoj, ni volas paroli, skribi esperante por disvastigi la lingvon kaj la agadojn de nia klubo. La kursoj baldaŭ finiĝos, sed ni volas daŭrigi venontan jaron por vojaĝi per esperanto.

Kaj la mezlernejo Emilie de Rodat :

Coucou,

Pour faire le bilan de cette année, nous allons faire court ! Mais avant, présentons-nous : nous sommes 6 élèves de la classe européenne en 5e. Nous avons suivi en début d'année une initiation aux langues latines et à la fin de ce parcours Samia est venue nous présenter l'espéranto au collège. L'idée d'apprendre cette langue nous a charmés car pour l'Europe nous voulons une langue commune et pour le monde entier aussi. Nous avons décidé de présenter l'espéranto à notre classe pendant le cours de français pour que tous les élèves réfléchissent sur la solution de l'espéranto comme langue commune.



Bela etoso dum Kataluna Printempa Renkontiĝo



Dum la pasinta majo, kelkdeko da esperantistoj, kiuj partoprenis la Katalunan Printempan Renkontiĝon, okazigitan de la Kataluna Esperanto Asocio (KEA), invadis la trankvilan katalunan urbeton Vallorguina (pr. *baljurgina*). Inter tiuj invadantoj estis tri junuloj el Tuluzo.

Por mi tiu renkontiĝo estis grava, unue ĉar tiam mi estis partopreninta nur unu grandan renkontiĝon (la germanan Internacian Seminarion), kaj ĉar, finfine, tie mi estis konatiĝonta kun la lokaj esperantistoj, pri kiuj mi multe aŭdis antaŭe, sed kiujn mi preskaŭ ne konis (krom tiuj kiuj partoprenis manifestacion por la okcitana lingvo antaŭnelonge, vidu lastan numeron de la *Krokodil'*). Tio estis grava por mi, ĉar kvankam mi estas katalunlingvano, mi ne konis la katalunan movadon, pro tio ke mi eklernis esperanton kiam mi jam estis forlasinta Barcelonon.



Kiel atendite, dum tiu semajnofino ni kisis, brakumis kaj estis gajaj, kaj certe ni ne estis solaj. Ni ĉiuj eliris la renkontiĝejon pli kontentaj ol ni alvenis. Kaj pro tio mi volas danki al la organizantoj.

Do, kion ni faris por tiom kontentiĝi? Simple, ni nur klopodis amuziĝi, kantante, dancante, ŝercante (tio, kun iom da helpo de la redaktoroj de la *Ĉiesrevujino*¹), ktp. Okazas ke kelkaj el la partoprenintoj bone konas katalunan festeman popularan muzikon kaj ili eĉ bone ludas kelkajn muzikilojn, tiel ne eblas ne festumi! Dum vespero kaj nokto, kelkaj el ni, ĉe la drinkejo, vortludis muzike. Unu el la plej amuzaj ludoj estis improvizi. Ni lernis tradician valencian kanton, kiu nepre enkondukas improvizon, tiel, dum iu kantas, la aliaj devas pensi bonajn vortojn por kante respondi al la kantanto. Unue, la ludo ne facilis al tiuj, kiuj neniam improvizis

¹ <http://cxiesrevujino.blogspot.com/>

antaŭe, sed post kelka tempo la ridoj estis neeviteblaj kaj laŭtaj. Alia ludo sukcesa kaj amuza estis krei novajn dialektojn de esperanto laŭ lokaj manieroj paroli la katalunan. Tiel, mi minorkigis² esperanton per uzo de “sala” artikolo ("sa" anstataŭ "la") kaj rekta traduko de kutimaj insulaj esprimoj. Amuzege, kaj ankaŭ interese, ĉar per rekta traduko ni ĉiam povas rigardi niajn esprimojn el alia vidpunkto kaj, tiel, ilin pli bone kompreni kaj valorigi.



Sed ne ĉio okazis dumnokte kaj drinkeje, ankaŭ la taga programo estis riĉa kaj interesa. Estis multaj interesaj programeroj, ekzemple, okazis plurnivelaj kursoj de esperanto por la novuloj, dancado de internaciaj popolaj dancoj sub bela blua ĉielo, malkovrado de esperanta lernejo en



Togolando, prelego pri kopirajtoj kaj libera kulturo, kaj ekskurso al la arbaro por observi kaj kompreni la lokan naturon.

Kiel dirite, revenante tuluzen ni ĉiuj estis gajaj kaj forlasantaj novajn amikojn, kiujn ni certe klopodos revidi estonte, eble dum la venonta Senprograma Renkontiĝo (SPR) kiu okazos julie en la suda Valencilando, okazigita de la Kataluna kaj Valenciana Esperanto-Junularo (KEJ /VEJ) kaj de Varsovia Vento. La katalunoj certe meritas estis konataj kiel la plej festemaj esperantistoj en la mondo.

Pere Quintana Seguí

Fotoj de Sjoerd

<http://fotoj.homeip.net/Sjoerd/2007-05-04/>

<http://fotoj.homeip.net/Sjoerd/2007-05-05/>

<http://fotoj.homeip.net/Sjoerd/2007-05-06/>

VIDPUNKTO

La biblioteko de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo

Unue, ni volas danki s-ron Roger Cuquel, kiu loĝas en Cahors, kaj ĵus donacis al ni grandan keston da libroj. Dank' al tio, nia biblioteko aktuale havas preskaŭ 1.500 librojn, grandparte literaturajn.

Fakte, la biblioteko fondiĝis en 1992 dank' al la malavaraj donacoj de la tuluzaj esperantistoj, unuavice la librostokoj de Esperanto-Haute-Garonne kaj Esperanto-31. Poste ni ricevis plurajn kvantajn donacojn, aparte de s-roj E. Guillemot, Blaye, A. Albault, R. Cuquel, kaj ankaŭ plurajn individuajn aldonacojn.

Cetere, vi povas «deponi» librojn en la bibliotekon: ili restas via posedaĵo, sed vi tiel ebligas al aliaj esperantistoj legi ilin, kaj vi povas repreni ilin kiam vi volas.

La plej interesa duono de la libroj troviĝas en nia «akceptejo» ĉe la *Maison de Quartier Rangueil*. La alia duono estas en la «rezervejo», t.e. en mia domo. Vi povas konsulti la libroliston en nia retejo (<http://esperanto.toulouse.free.fr>)

Kun pli ol 200 romanoj; pli ol 300 novelaroj, rakontaroj, bildstrioj; pli ol 120 poemaroj; preskaŭ 250 teatraĵoj; preskaŭ 250 vortaroj, lernolibroj, kaj aliaj libroj pri la lingvo esperanto mem; pli ol 200 libroj pri la historio kaj aktualaĵo de la esperanto-movado; pli ol 350 libroj pri historio, scienco, kaj ĉiaj temoj; kune kun 20-o da gazetoj en centoj da numeroj – la biblioteko estas neelĉerpebla fonto de distro kaj edifo!

Vi povas konsulti kaj pruntepreni la librojn nur lunde inter la 16a kaj 19a horoj. Bedaŭrinde, ekde la 2a de julio la *Maison de Quartier* restos fermita dum la tuta somero, ĝis la 24a de septembro. Vi povas rezervi librojn telefonante au retumante al mi (rcash@free.fr), kaj veni preni ilin ĉe mi, kun rendevuo.

Sed bona novaĵo estas ke la metrostacio *Rangueil* de B-linio troviĝas nur kelkajn metrojn de nia akceptejo. Ni esperas ke tia venfacileco instigos pli oftajn vizitojn al la biblioteko en la venonta jaro.

– Rikardo

KUNLABORU KUN LA KROKODIL'!

Ĉu vi ĉeestis en iu aranĝo rilata al Esperanto?
Ĉu vi konas iun interesan retejon por esperantistoj? Ĉu vi estas skribema?

Sendu viajn kontribuojn al nia bulteno, tiel ĝi pliboniĝos! Kaj ne forgesu sendi viajn fotojn!

La retadreso de la redaktoro estas

pere@quintanasegui.com

Pere Quintana Seguí